

AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ

Accademia
Internazionale
delle Scienze

International
Academy
of Sciences



San-Marino

Internationale
Akademie der
Wissenschaften

Académie
Internationale
des Sciences

34-a SANMARINECA UNIVERSITATA STUDADSESIO

SUS 34

Varsovio / Warszawa (PL)

2017-09-10 / 15

(1717 pFR/dfR)

Vierunddreißigste Sanmarinesische Universitäre Studientagung

Trentaquattresima Sessione Universitaria Sammarinese

Thirty-fourth Sanmarinian University Session

Trente-et-quatrième Séance Universitaire Sanmarinienne

Trzydziesta czwarta sesja uniwersytecka San Marino

*Laborlingvoj · lingue di lavoro · Arbeitssprachen · working languages · langues de travail
la Internacia Lingvo (ILO) · italiano · Deutsch · English · français · polski*

Enhavo

1	Oficialaĵoj	3
2	Kursoj kaj prelegoj	3
2.1	Sciencaj kursoj	3
2.2	Lingvokurso	3
2.3	Liberaj, docentiĝaj kaj debutaj prelegoj (konferencprogramo de SUS 34)	4
3	Kandidataj finekzamenoj	4
4	Kadra Programo	5
5	Organizaj detaloj	5
5.1	Kursoj kaj kursfinaj ekzamenetoj	5
5.2	Prelegoj	5
5.3	Administrado	6
5.4	Aliĝo	6
5.5	Mono	7
5.6	Salonoj	7
6	Instruteko	8
7	Situo de Varsovio	8
7.1	Varsovio en Pollando	8
7.2	Trafiko	8
7.2.1	Kiel iri al Varsovio	8
7.2.2	Kiel moviĝi en Varsovio	8
7.3	Pliaj informoj	9
	Mapo	10
	Programtabelo	12

Programo de SUS 34

La studadsesio SUS 34 de AIS okazas en Varsovio (Warszawa, PL) en ejoj de *Warszawska Szkoła Zarządzania – Szkoła Wyższa* (WSZ – SW; Varsovia Lernejo pri Direktado – Altlernejo).

La tempoj indikitaj en tiu ĉi eldono estas provizoraj kaj povas ŝanĝiĝi. Bonvolu atenti informojn afiŝitajn de la SUS-sekretariejo. Gravaj novaĵoj estas anoncataj ĉe la SUS-ejo: WSZ – SW, ul. Siedmiogrodzka 3A, 01-204 Warszawa.

Mapeto sur paĝo 10 montras la situon de la ejoj. Bonvolu atenti, ke la mapeto estas nur skizo kaj ne montras ĉiujn stratojn.

La retejo de WSZ – SW estas www.wsz-sw.edu.pl.

1 Oficialaĵoj

dato	tempo	evento	ejo
09-10 dim	anoncota 17:30	Senatkunsido Interkona vespero	anoncota Klubejo „Obroty Rzeczy“
09-11 lun	10:00–11:00 11:00–12:00 16:45	Solena inaŭguro Prelego pri la historio de AIS Asembleo de la Subtena Sektoro	WSZ – SW WSZ – SW WSZ – SW
09-13 mer	10:00	Studfinaj ekzamenoj	WSZ – SW
09-15 ven	13:30 16:00 17:00	Akademia Forumo ĜA de la Scienca Sektoro fermo de SUS 34	WSZ – SW WSZ – SW WSZ – SW

2 Kursoj kaj prelegoj

2.1 Sciencaj kursoj

La sekvaj kursoj – valoraj po inter 0,5 kaj 1,0 stud-unuoj (stu) – okazos ekde lundo ĝis ĵaŭdo (09-11 – 09-14), en blokoj nomataj A/B/C/D¹. La paŭzo tagmeza nomiĝas M. La kursestroj kaj kursanoj povas interkonsenti pri paŭzo dum la blokoj kaj kompensa plilongigo.

Laŭ peto de la gastigantoj la unua bloko estis mallongigita kaj komenciĝas nur je la 10-a horo.

	A	B	M	C	D
tempo	10:00–10:45	11:00–12:45	12:30–14:00	14:00–15:45	16:00–17:45

Sekcio 3: Struktursciencoj

S1 OProf. Christer Kiselman (Svedio)

Digita geometrio, matematika morfologio kaj diskreta optimumado (bloko D)

Kvar lecionoj (marde kaj merkrede), 0,5 stu.

Sekcio 4: Filozofio

F1 OProf. Reinhard Fössmeier (Germanio)

Enkonduko en la logikon (bloko C/B)

Ok lecionoj (de lundo al ĵaŭdo), 1,0 stu. La kurso prezentas la elementojn de la propozicia logiko el iom matematikeca vidpunkto.

Sekcio 5: Natursciencoj

N1 OProf. Hans Michael Maitzen dr (Aŭstrio)

Astronomio. (bloko B)

La preciza temo estas anoncota.

Bonvolu rigardi ankaŭ la ĉapitron pri retaj kursoj (6).

2.2 Lingvokurso

Pro tempaj restriktoj komence de SUS 34 ne povas okazi la kutima „ILO-kurso por komencantoj“.

¹Por eviti miskomprenojn ni ne uzas la literon Ĉ por marki blokon.

2.3 Liberaj, docentiĝaj kaj debutaj prelegoj (konferencprogramo de SUS 34)

Liberaj kaj projekt-akceptigaj prelegoj okazas en la sekciaj salonoj, sub la gvido de la dekanoj aŭ de iliaj komisiitoj. Partoprenantoj povas proponi prelegojn ankaŭ surloke.

H-p1 OProf. Hans Michael MAITZEN dr (Aŭstrio)

Superrigardo pri la historio de AIS. (lu, 11:00)

AIS San Marino oficiale fondiĝis en 1985, sed fakte eklaboris jam en 1983. La prelego prezentos superrigardon pri tiuj 34 jaroj da universitata laboro en la internacia lingvo.

H-p2 Yuro JUNG (Unika; Japanio)

Elementoj de la korea lingvo. (ĵa, 10:00)

H-p3 ADoc. Zlatko HINŠT dr sc (Kroatio)

Sana urbo laŭmezure de la homo, kun ekzemplo de Zagreb. (ma, 10:00)

La sciencaj kampoj de la temo de ĉi-tiu laboraĵo plejparte rilatas al urba sociologio kaj socia ekologio. Ĝi estas sintezo de ideoj de movado iniciita de Monda organizo pri sano (MOS) „Sana urbo“ (kiu en la jaro 198 en Zagreb ekestis kun kerna grupo de eŭropaj urboj – Londono, Kopenhago, Vieno, Munkeno, Milano, membro de ĉi-tiu movado kaj projekto), kaj konsideradoj el libro de la konata kroata kaj eksjugoslavia sociologo profesoro Rudi Supek, titolita „Urbo laŭmezure de la homo“ (kun subtitolo „El vidpunkto de kultura antropologio“) eldonita en la jaro 1987. La prelego estas samtempe memoroj al meritaj protagonistoj de koncernaj movado kaj libro kun ĝia aŭtoro. La koncernaj eventoj nun estas jam historio, sed kun aktualaj rerigardoj al nunaj stato, celoj kaj perspektivoj je la niveloj de pluraj aspektoj en Zagreb kaj Kroatio (enkadre de la projekto *Zagreb Sana urbo* kaj de Kroata reto de sanaj urboj). Je la mezo de atenteco estas precipe trafiko kaj inkluziviĝo de tiel nomataj marĝenaj, aŭ riskaj aŭ vundeblaj grupoj (invalidoj, maljunaj personoj, infanoj) en urbaj vivo, spaco kaj trafiko kun rimedo de socia integrado kaj urba politiko.

H-p4 ASci. Mag. Małgosia KOMARNICKA (Pollando)

Profilo de pliaĝulo-studento de Esperanto. (ma, 10:40)

H-p5 Barbara KULPIŃSKA (Pollando)

temo anoncota (ma, 14:00)

F-p1 ASci. Mag. Małgosia KOMARNICKA (Pollando)

Espeanto kaj monda paco. (lu, 16:00)

N-p1 OProf. Dr. habil. Jerzy LECHOWSKI (Pollando)

Informemocia teorio de sukceso kaj feliĉo (ma, 14:40)

M-p1 Barbara PIETRZAK (Pollando)

95-jariĝo de la E-Radiofonio (ma, 15:20)

3 Kandidataj finekzamenoj

La finekzamenoj por kandidatoj, kiuj celas originale aŭ per adapta adopto akiri ĉe AIS la agnoskon de akademia nivelo (bakalaŭreco, magistrecio, doktoreco aŭ habilit-doktoreco), okazas je merkredo: (09-13), laŭ surloke afiŝota horaro.

La kandidatprelegoj estas publikaj, kaj ĉiuj SUS-anoj estas bonvenaj ĉeesti la prelegojn de la kandidatoj kaj la postajn diskutojn. Parolaj fakekzamenoj (nepublikaj) kaj skribaj ekzamenoj (se necesaj) okazas laŭ horaro afiŝota de la Ekzamenofico.

Kandidatoj, pri kies dokumentoj estas iuj duboj, bonvolu jam antaŭ SUS interkonsenti kun la ekzamen-ofico pri la procedo por klarigi la dubojn. Ne okazas publikaj konsult-horoj.

Ĉiu kandidato antaŭ sia finekzameniĝo nepre devas esti enskribiĝinta al minimume du (2) sciencaj SUS-kursoj (se li ne jam havas la bezonatajn kurs-atestojn). Inter la du kursoj unu devas esti en la

sekcio, en kiu okazas la kandidatigo, unu devas esti el alia sekcio. Entute estas bezonataj kvar (4) atestitaj kursaj studunuoj; nur por adapta adopto sufiĉas, laŭ la novaj regularoj, la du SUS-kursoj. La Ekzamenofico atentigas kandidatojn, ke prezentiĝo al la fina ekzameno sen antaŭa regularkonforma kompletigo kaj disponigo de ĉiuj necesaj dokumentoj al la Ekzamenofico povas kaŭzi aŭ **malakcepton** de la kandidatigo aŭ **postulon de krompago** superanta la normalan ekzamenkoston pro la kroma laboro.

4 Kadra Programo

Laŭtradicie AIS invitas ĉiujn SUS-anojn al la partopreno en la **Akademia Forumo** (2017-09-15) kun publika diskuto. Escepte la forumo okazas ne vespere, sed vendrede posttagmeze. Okazas kunsido de la **Subtena Sektoro** (2017-09-11) kaj **ĝenerala asembleo (ĜA) de la Scienca Sektoro** (2017-09-15). Tie voĉdoni rajtas la subtenaj membroj resp. la efektivaj membroj. En la ĜA krome ĉiuj adjunktoj havas la rajton ĉeesti; asociitaj docentoj (ADoc) havas krome la parolrajton.

La sekcioj de la Scienca Sektoro, kiuj ankoraŭ ne elektis sian estraron por la periodo 2016–2019, bonvolu laŭeble fari tion dum SUS 34.

Inaŭguro. Dum la inaŭguro estas sonigataj la himnoj de Pollando kaj San-Marino. La himno de San-Marino (*Inno Nazionale della Repubblica*) ne havas tekston. La pola himno nomiĝas *Mazurek Dąbrowskiego* (mazurko de Dąbrowski) kaj memorigas la polan strebon je sendependeco ĉirkaŭ la jaro 1800, kiam la polo Jan Henryk Dąbrowski gvidis polan legion por Napoleono Bonaparto (tekstoj el Vikipedio, artikolo „Mazurek Dąbrowskiego“):

Jeszcze Polska nie zginęła
Kiedy my żyjemy.
Co nam obca przemoc wzięła,
Szablą odbierzemy.

Marsz, marsz Dąbrowski,
Z ziemi włoskiej do Polski
Za twoim przewodem
Złączym się z narodem.

(teksto de Józef Wybicki)

Ankoraŭ Pollando ne pereis
dum kiam ni vivas.
Kion de ni fremda forto prenis,
ni per sabro reakiros.

Marŝu, marŝu, Dąbrowski,
de la itala tero al Pollando
Sub via gvido
ni unuiĝos kun la nacio.

(laŭvorta traduko)

La Polujo ne pereis
dum ni vive spiroj,
Kion fremda forto prenis,
forto reakiros.

Marŝu, Dąbrowski,
el itala lando;
Al patruj' nin gvidos
via ĉefkomando.

(libera traduko)

5 Organizaj detaloj

Ĉiu interesulo rajtas aliĝi al SUS. Ne necesas formalaj sciencaj kvalifikoj.

5.1 Kursoj kaj kursfinaj ekzamenetoj

Ĉiu SUS-ano rajtas senpage enskribiĝi kaj partopreni kursojn (tion inkluzivas la aliĝkoto). Kontraŭ aparta kotizo (po 0,3 AKU por unu kurso) oni ricevas oficialan ateston kun noto, se oni sukcesis en la kursfina ekzameneto. La ekzameneton oni rajtas partopreni sen ĉeesti la kurson dum la sama SUS, do iamaj anoj de samtema kurso povas ripeti la ekzameneton. Ankaŭ pri kursoj ofertataj en la *instruteko* (vidu ĉapitron 6) povas okazi ekzamenetoj por studentoj, kiuj aŭtodidakte preparis sin.

La kursfinaj ekzamenetoj de la sciencaj kursoj okazas laŭ anonco de la kursestroj. La SUS-anoj, kiuj intencas akiri kurs-atestojn, enskribiĝu al la kursoj ĉe la SUS-oficejo komence de SUS aŭ anoncu sian intencon dum la unua leciono.

5.2 Prelegoj

La preleg-kunsidojn gvidas la dekanoj aŭ vicdekanoj de la koncerna sekcio, aŭ komisiitoj de ili. La partopreno en prelegoj (kontraŭe al partopreno en kunordigita preleg-serio) ne

egalvaloras al kurspartopreno kaj ne rezultigas stud-unuojn.

Debutprelegojn prezentas nove alvokitaj profesoroj, *docentiĝprelegojn* estontaj plenrajtaj docentoj de AIS. La preleglingvo estas ILo. La prelegoj daŭras po 40–60 minutojn, inkluzive de diskuto kaj paŭzeto. La sama tempo estas je dispono por *invititaj prelegoj* (en iu ajn oficiala lingvo de AIS) kaj por *projekt-akceptigaj prelegoj* (en ILo) de kandidatoj, kiuj celas estontan originalan akiron (ne adopton) de grado de AIS.

Ankaŭ liberaj ISKanoj (t. e. ISKanoj, kiuj ankoraŭ ne kiel adjunktoj aŭ efektivaj membroj apartenas al AIS) rajtas prezenti t. n. *liberajn prelegojn*. Tiaj prelegoj rajtas okazi en iu ajn oficiala lingvo de AIS kaj daŭri po 25–40 minutojn.

Ankaŭ *konciz-prelegoj* (10–20 minutoj) povas okazi en ajna oficiala lingvo de AIS. Ili estas oferteblaj ankoraŭ post la starigo de la SUS-programo. Temoj de konciz-prelegoj ne listigitaj en la programkajero estos afiŝataj dum SUS laŭ la informoj transdonitaj de la prelegontoj al la SUS-oficejo. Laŭeble la prelegontoj mem pretigu du identajn A4-foliojn afiŝeblajn.

5.3 Administrado

La sekretario de SUS 34 funkcios lunde, marde, ĵaŭde kaj vendrede en la matena kurspaŭzo je la 10:45, krome laŭ interkonsento.

5.4 Aliĝo

Aliĝilojn bonvolu sendi al la loka organizanto, Mag. Małgosia Komarnicka, per la adreso informado.eo@gmail.com. Informoj pri SUS 34 troviĝas rete ĉe <http://www.ais-sanmarino.org/arangxoj/sus/sus34>.

Studentoj kun valida studenta numero povas aliĝi neformale per simpla retmesaĝo.

Bonvolu atenti, ke aliĝoj ne estas trakteblaj sen pago de la aliĝkotizo. La kotizo ne inkluzivas ekzamenkostojn, kurskotizojn (por ricevo de atesto), kostojn por loĝado kaj manĝado. Aliĝo ne estas transdonebla.

SUS ne asekuras siajn partoprenantojn kontraŭ malsano, akcidentoj aŭ io alia. Bonvolu atenti, ke multaj malsan-asekuroj ne kovras malsanon en eksterlando, precipe asekuroj el ekster EU. Konsilindas speciala asekuro por eksterlandaj vojaĝoj.

Pagi aliĝkotizon devas ankaŭ *kursgvidontoj* kaj *prelegontoj*; ili ricevos sian kotizon post sia kontribuo. Kurs- kaj prelegproponoj kaj aliĝoj por ekzameno estas trakteblaj nur post alveno de la SUS-aliĝkotizo.

Ĝis kvar semajnojn antaŭ la komenco de la sesio (t. e. ĝis 2017-08-12) la aliĝkotizo estas nur 0,3 AKU, poste 0,5 AKU. Kotizo por unutaga partopreno en SUS estas po 0,2 AKU. Partoprenantoj el reform-eŭropaj kaj kompareblaj landoj rajtas je rabato de **75 %**. La kotizo estas pagebla laŭ jenaj vojoj (ĉiam kun indiko de la pagocelo kaj de la nomo de la aliĝanto):

- al la germana konto de AIS: IBAN DE19 2501 0030 0002 0513 05, BIC: PBNKDEFF.
- tra *PayPal*; bonvolu uzi la ligilon sur la startpaĝo de la AIS-retejo.
- al la UEA-konto de AIS: aisc-j.
- Pro la altaj bankokostoj ni petas ne sendi ĉekojn.

ISKanoj, kies servobonhavo havas krediton de almenaŭ 0,5 AKU, povas simple deprenigi la kotizon de ĝi. Dumvivaj subtenaj membroj kaj studentoj kun valida studenta numero ne pagas SUS-kotizon, se ili aliĝas minimume unu monaton antaŭ la sesio; poste ili pagas 0,2 AKU.

5.5 Mono

Kadre de AIS kostoj kaj prezoj estas indikataj en „Akademiaj Kotiz-Unuoj“ (AKU). 1 AKU nun valoras € 65,00. Dum SUS 34 AIS akceptas pagojn nur en eŭroj kaj polaj zlotoj (PLN). En julio 2017 la kurzo de la zloto estis inter 0,23 kaj 0,24 eŭroj; unu eŭro valoris inter 4,2 kaj 4,3 zlotoj. Kelkaj polaj mon-aŭtomatoj proponas „garantiitan kurzon“, kiu tamen estas konsiderinde pli malbona.

5.6 Salonoj

Dum SUS 34 la tradiciaj nomoj de la SUS-salonoj estas dinamike atribuitaj al la prelegejo, depende de la okazanta kurso aŭ prelego. La tradiciaj nomoj estas tiuj de jenaj eminentuloj:

ARISTOTELO de Stagira / *Αριστοτέλης* (384–322 a. K.)

Helena filozofo, fondinto de la empiria naturscienco en la kadro de ampleksa empiria sistemo kondukanta de la logiko ĝis la ŝtatteorio. Liaj instruoj ĝis la fino de la mezepoko restis la fundamento de sciencaj instruado kaj esplorado. Li estis disĉiplo de Platono kaj instruisto de Aleksandro la Granda.

Georges BOULANGER (1909–1982)

Fondinto (en 1957) de *Association Internationale de Cybernétique* (Namur, BE) kaj ties prezidanto ĝis sia morto; en 1980 enkondukis en tiun asocion ILOn kiel trian laborlingvon, eklerninte ĝin kiel 70-jarulo. Vicprezidanto de Eŭropa Klubo kaj membro de ties iniciat-grupo AIS.

René DESCARTES, Latine: Renatus Cartesius, ILe: Kartezio (1596–1650)

„La patro de la moderna filozofio“, kiel oni ofte nomas lin, provis ligi filozofion al la natursciencoj aplikante al ambaŭ racian metodon. Sian mekanikan mondkoncepton li aplikis eĉ en psikologio. Li skizis ankaŭ principojn de planlingvo en sia letero de la 20-a de novembro 1629 al la benediktana scienculo *Mersenne*.

EŬKLIDO de Aleksandrio / *Ευκλείδης* (ĉ. 365–ĉ. 300 a. K.)

Helena matematikisto kaj naturesploristo, kiu laboris sub Ptolemeo (Ptolemaios, *Πτολεμαῖος*) la 1-a ĉe la „Museion“ en Aleksandrio. Lia plej fama verko estas la libro „Elementoj“, aksioma prezento de la tutaj tiamaj geometrio kaj aritmetiko. Krome li verkis manlibron „Geometria optiko“ kaj aliajn traktaĵojn pri planimetrio, sfero kaj matematika muzikteorio.

Galileo GALILEI, ILe: Galilejo (1564–1642)

Kvankam liaj ideoj troviĝas kadre de la kristana mondkoncepto, la itallingva natursciencisto konfliktis kun la katolika eklezio pro sia verko pri la galaksi-modeloj, en kiu li argumentas por nova, kies centro estas la suno. Kiel unu el la unuaj sciencistoj li verkis ne plu en la latina lingvo, nekomprenata de vasta publiko.

Mohandas Karamchand GANDHI / *मोहनदास करमचंद गांधी* (1869–1948)

Barata (hinda) politikisto, kiu proklamis senbatalilan ribelon kontraŭ la okupadaj trupoj, per manŝpinado kontraŭ la teksaj fabrikoj de Britio, per „salmarŝo“ kontraŭ la brita salmonopolo, per reiro al simpla natura vivoformo, por formi sendependan komunan ŝtaton de hinduoj kaj islamanoj. Li subtenis la ideon de la Internacia Lingvo, kunlaborante kun la svisa sciencisto *Edmond Privat*.

Jan Amos KOMENSKÝ, Latine: Iohannes Amos Comenius. ILe: Komenio (1592–1670)

La fondinto de la moderna pedagogio ne nur teorie, sen ankaŭ praktike kontribuis al sia fako, i.a. per facila lingvoinstrua legolibro. Li proponis la enkondukon de planlingvo kaj la starigon de internacia akademio de la sciencoj.

Giuseppe PEANO (1852–1932)

La itala matematikisto interalie starigis sistemon por aksioma difino de la naturaj nombroj. En 1903 li prezentis planlingvan projekton de simpligita Latino, nomatan „*Latino sine flexione*“; en tiu lingvo li eldonis sian verkon *Formulario Mathematico*. Ekde 1909 li estis prezidanto de la planlingva akademio *Accademia pro Interlingua*.

Hermann SCHMIDT (1894–1968)

Jam en la jaro 1941 la germana fizikisto kaj regulad-teknikisto prezentis la bazajn principojn de kibernetiko. Ekde ĉ. 1962 li pli kaj pli influis la filozofion de klerig-kibernetiko kaj de aliaj antropokibernetikaj branĉoj.

6 Instruteko

Dum SUS 34 eblas akiri studunojn ankaŭ surbaze de memstara studado de kursoj el la instruteko de AIS, se la kandidato sukcesas en kursfina ekzameno per noto de minimume 7/10. La ekzameno povas okazi dum SUS 34, se la kandidato sciigas sian deziron kun indiko de la elektita(j) kurso(j) plej malfrue **ses semajnojn** antaŭ la malfermo de SUS 34 al la klerigofico (OProf. H. D. Quednau, Plönbacher Str. 21, DE-85410 Haag / Amper, Germanio).

Superrigardo pri la interretaj kursoj de AIS troviĝas ĉe <http://www.ais-sanmarino.org/kursoj/>. Sed ne ĉiuj tiuj kursoj estas disponeblaj por ekzameno dum SUS 34. Ĉe intereso bonvolu informiĝi ĉe la klerigofico.

Jenaj du kursoj de OProf. Amri Wandel estas disponeblaj el ne-AIS-aj retejoj, tamen validas kiel AIS-kursoj:

- Astrobiologio (tri lecionoj, tri ekzamenoj): <http://edukado.net/klerigejo> (klaku la AIS-signon; necesas registriĝi aŭ ensaluti)
- Astrofiziko kaj la Sunsistemo (lecionoj 1–5): www.universitato.info

7 Situo de Varsovio

7.1 Varsovio en Pollando

Varsovio (pole: Warszawa, prononco: *varŝava*) estas la ĉefurbo de Pollando kaj situas iom oriente de la centro de la lando. Ĝin trafluas la rivero Vistulo (pole: Wisła), de sud-oriento al nord-okcidento. La urbocentro (*Śródmieście*) estas sur la maldekstra, okcidenta bordo.

Fine de 2015 Varsovio havis ĉ. 1,74 milionojn da loĝantoj.

7.2 Trafiko

7.2.1 Kiel iri al Varsovio

Varsovio posedas internacian flughavenon „Ŝopeno“ (pole: *Lotnisko Chopina*). Ĝi situas ĉ. 10 km sud-okcidente de la urbocentro. Ĝia retejo estas <http://www.lotnisko-chopina.pl>; ĝi iam informis en dek lingvoj, sed nun nur en la pola kaj la angla.

De la flughaveno dumtage iras du lokaj buslinioj, numero 175 al la metroa stacio *Centrum*, pasante la fervojan stacion *Ochota*, kaj numero 188 al kvartalo Praga Południe (Suda), pasante la metroan stacion *Politechnika*.

Ekde la 1-a de junio 2012 funkcias fervojo inter la flughaveno kaj la urbocentro. Busoj tamen trafikis pli ofte.

La centra fervoja stacio por longdistancaj trajnoj estas *Warszawa Centralna*. Apud ĝi estas aŭtobusa stacio por la longdistancaj busoj de PKS.

7.2.2 Kiel moviĝi en Varsovio

Varsovio posedas du metroajn liniojn kaj traman kaj aŭtobusan retojn. La tri trafikiloj uzas komunajn biletojn. La bileta sistemo ne estas tute simpla, ĉar necesas distingi inter biletoj por unu veturilo kaj por pluraj veturiloj (kun vagon-ŝanĝo).

La retejo de la varsovia publika trafiko estas: <http://www.ztm.waw.pl/>. Ĝi informas pole kaj angle (en 2012 ĝi krome informis germane kaj ruse). La trafik-areo estas dividita al du zonoj, unu kerna (1) kaj unu ringa (2) ĉirkaŭ la kerna. La SUS-ejo WSZ – SW situas en la kerna zono, same la flughaveno kaj la ĉefa fervoja stacio.

La dua metroa linio nun atingas la stacion *Rondo Daszyńskiego*, kiu tamen foras ĉirkaŭ unu kilometron de la SUS-ejo. Pli proksima estas la busa haltejo *Szpital Wolski*, atingebla de

la ĉefstacidomo (*Dworzec Centralny*) per la busaj linioj 109 kaj 171 (kvin aŭ ses stacioj, depende de la direkto).

Krom mallongtempaj (minutaj) kaj unuveturilaj biletoj ekzistas abonoj por 24 horoj. Tia abono kostas (en aprilo 2017) 15 zlotojn por zono 1. Tritaga bileto kostas 36 zlotojn.

7.3 Pliaj informoj

SUS-ejo. La SUS-programo okazas en la altlernejo *Warszawska Szkoła Zarządzania – Szkoła Wyższa*. Ĝi situas ĉ. 1,5 km okcidente de la urbocentro kaj estas atingebla per busaj linioj. Bonvolu konsulti la mapo-skizon sur paĝo 10.

Elektro. La elektra tensio en Pollando estas 230 V, kiel en la pliparto de Eŭropo. La ŝtopilingoj estas de la franca tipo E, alinome CEE 7/5, do havas elstaran stifton por la protekta terkontakto. Kontakt-ŝtopiloj de tipo F (CEE 7/4, ekzemple germanaj) estas uzablaj nur, se ili havas truon por tiu stifto, kiel sur la apuda bildo. Dukontaktaj eŭropaj ŝtopiloj sen terkontakto estas uzablaj. Usonaj kaj britaj ŝtopiloj bezonas adaptilon.



Klimato. La vetero komence de septembro ofte estas ankoraŭ iom varma, sed jam konsiderinde malpli ol en julio kaj aŭgusto; la meza temperaturo maksimuma estas 17,9 °C, la minimuma 8,6 °C. Mezume en tuta septembro estas nur 49 mm da pluvo. Tamen bonvolu atenti, ke AIS estas sen-profeta asocio.

Alkoholo. En Pollando estas malpermesite trinki alkoholon surstrate.

Telefonado. La internacia antaŭnumero de Pollando estas **48** (Varsovio: +48-22). Ĉiam necesas uzi la lokan kodon (Varsovio: 22). Por konekto el Pollando alilanden ciferumu **00**.

Telefona krizo-voko. (Ĉiuj informoj estas sen garantio.) Uzantoj de poŝ-telefono povas ĉiulande atingi ĝeneralan krizo-servon per la numero 112. Por kabloretaj telefonoj la situacio estas iom malpli simpla, ĉar ekzistas en Pollando almenaŭ kvar pliaj krizo-vokaj numeroj:

- Polico: **997** (poŝ-tel: 22-997)
- Fajrobrigado: **998** (poŝ-tel: 22-998)
- Ambulanca savoservo: **999** (poŝ-tel: 22-999)
- Urba polico de Varsovio: **986** (poŝ-tel: 22-986)

Klarigoj al la mapeto sur paĝo 10:

WSZ
SW = Warszawska Szkoła Zarządzania – Szkoła Wyższa (SUS-ejo)


OR = klubejo Obroty Rzeczy, ul. Tarczyńska 3a (interkona vespero)

$A_1 \dots A_4$: aŭtobusaj haltejoj proksime de WSZ – SW

- A_1 : Szpital Wolski, al la centro (linioj 105, 109, 136, 155...)
- A_2 : Szpital Wolski, de la centro (linioj 105, 109, 136, 155...)
- A_3 : Rogalińska, al la centro (linio 102)
- A_4 : Rogalińska, de la centro (linio 102)

La veturdaŭro al/de la urbocentro estas inter 10 kaj 20 minutoj.

La fervojo iras subtere, proksime de Aleje Jerosolimskie. Stacio *Warszawa Centralna* estas la centra stacio por longdistancaj trajnoj.



Kelkaj utilaj esprimoj en la pola lingvo

Esperanto	Pola	Proksimuma prononco
jes	tak	tak
ne	nie	nje
bonan tagon!	dzień dobry	dĵienj dobry
bonan vesperon!	dobry wieczór	dobry vjeĉur
bonan apetiton!	smacznego	smaĉnego
bonan nokton!	dobranoc	dobranoc
saluton!	cześć	ĉeĉĉ
ĝis revido!	do widzenia	do vidzenja
pardonu!	przepraszam	pĥepraŝam
mi petas	proszę	proŝe
dankon!	dziękuję	dĵenkuje
mi ne komprenas	nie rozumiem	nje rozumjem
kie estas ...	gdzie jest ...	gdzje jest
necesejo	toaleta	toaleta
– por virinoj	damski / dla pań ○	damski / dla panj
– por viroj	męski / dla panów △	menski / dla panuf
mi petas la ŝlosilon	Proszę o klucz	Proŝe o kluĉ
de la necesejo	do toalety	do toalety
restoracio	restauracja	restaŭracja
stacidomo (fervoja)	dworzec (kolejowy)	dvoĵec kolejovy
haltejo	przystanek	pŝystanek
(y estas prononcata kiel malakra i, inter a kaj u)		
Skribe la vorto „brak“ (= manko) estas foje uzata kiel negacio („ne estas“).		

Specialaj literoj en la pola:

- ą – „a“ kun dekstra subhoko (vosteto, *ogonek*); prononcata kiel naza „o“
- ć – „c“ kun dekstra korno; prononcata kiel tre sibla „ĉ“
- ę – „e“ kun dekstra subhoko; prononcata kiel naza „e“, vortofine kiel „e“
- ł – „l“ kun trastroko; prononcata kiel „ŭ“
- ń – „n“ kun dekstra korno; prononcata kiel „nj“
- ó – „o“ kun dekstra korno; prononcata kiel „u“
- ś – „s“ kun dekstra korno; prononcata kiel tre sibla „ŝ“
- ź – „z“ kun dekstra korno; prononcata kiel tre sibla „ĵ“
- ż – „z“ kun punkto; prononcata kiel „ĵ“

Iuj litergrupoj havas apartan prononcon, ekz. „ch“ (ĥ), „cz“ (ĉ) kaj „rz“ (ĵ).

Tabela programo de SUS 34

	loko	A 10:00–10:45	B 11:00–12:45	M	C 14:00–15:45	D 16:00–17:45	V vespere
dim 10	OR						17:30 Interkona vespero
lun 11		Inaŭguro	Prelego Maitzen		Kurso Fössmeier	16:00 F-p1 Komar. 16:45 SubS	
mar 12		H-p3 Hinšt H-p4 Komar.	Kurso Maitzen		Kurso Fössm. H-p5 Kulpińska N-p1 Lechowski M-p1 Pietrzak	Kurso Kiselman	
mer 13		Studfinaj ekz.	Kurso Maitzen		Kurso Fössmeier	Kurso Kiselman	
ĵaŭ 14		H-p2 Unika	Kurso Fössmeier		Ekskurso en Varsovio		
ven 15		Kursfinaj ekzamenetoj			Akademia Forumo	Ĝenerala Asembleo Solena fermo	

OR = klubejo „Obroty Rzeczy“

Rapidkodo de la SUS-paĝo:



Kalendareto							
	lu	ma	me	ĵa	ve	sa	di
	4	5	6	7	8	9	10
sep	11	12	13	14	15	16	17
	18	19	20	21	22	23	24

Adresoj, ekzemple por demandi surstrate aŭ montri al taksisto

SUS-ejo

Warszawska Szkoła Zarządzania – Szkoła Wyższa
ul. Siedmiogrodzka 3A, 01-204 Warszawa

Interkona vespero

Klubejo *Obroty Rzeczy*, ul. Tarczyńska 3a
(„Obroty Rzeczy“, „la turniĝoj de la afero“, estas la titolo de
poezia volumo de Miron Białoszewski, publikigita en 1956)